# NOVAĴLETERO

Monata informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista - Reĝa Societo
Maandelijks informatieblad van de Brugse Esperanto-Groep, Kon. Maatschappij

Nr. 13 - Nov. 1984

Verantw. Uitgever:

Roland Rotsaert
Visspaanstraat 97
B-8000 Brugge

Tel. 050/33.00.04

---

**Lidgeld: 200 fr. per jaar op postrekening 000-0483533-85 van Bruĝa Grupo Esperantista, 8000 Brugge.** Steunende leden: 500 fr.

---

**Activiteiten**

| | |
|---|---|
| 3 december 1984 | "1300 jaroj da bulgara kulturo" door Vasja Cvetkova. (20 u., Hof van Watervliet, Oude Burg - op uitnodiging van Paco kaj Justeco) |
| 15 december 1984 | Voordracht met dia's over het voorbije wereldcongres in Vancouver (15 u., De Wandelinghe, Baron Ruzettelaan 110, 8320 Brugge 4, in het Nederlands, iedereen welkom !) |
| 23 december 1984 | La Progreso, Gent: Zamenhoffesto (ekde 15.45, Ritz, Sofie van Ackenstraat 17, 9000 Gent - informoj: P. Haerick, 091/30.51.20) |
| 19 januari 1985 | Jaarlijkse algemene vergadering |

---

**Congressen**

| | |
|---|---|
| 19-21 april 1985 | Markola Kongreso, Brugge |
| 3-10 augustus 1985 | 70e Wereldcongres, Augsburg (DBR) |
| zomer 1986 | 71e Wereldcongres, Bejing (China) - nu reeds 200 ingeschrevenen ! |

Estrarkunsido 1984.11.15

La estraro priparolis diversajn problemojn rilate al la grupa vivo kaj la venontjara Markola Kongreso. Plej grave por la membroj estas ke la kotizoj por 1985 restas senŝanĝaj kaj ke la kunvenoj nun okazos malpli ofte, sed je sabato.

Internacia Junulara Kongreso 1984 - Swanwick

Kaj do jen mi estis ironta al la IJK. Kune kun André Ruysschaert ni ekiris al Londono la 11an de julio. Servoje ni eliris en Canterbury kaj vizitis la urbeton kun ĝia fama katedralo.

En Londono ni promenis de Victoria-stacidomo ĝis Westminster-katedralo kaj parlamentejo. Dum la dua tago ni vizitis la britan muzeon (British Museum) kaj posttagmeze André preferis-la artgalerion (National Gallary) kaj mi vojeniris al la tre amuza kaj interesa scienca muzeo (Museum of Science) pri la evoluo de la scienco teĥnika sur diversaj kampoj. Kaj vendredvespere ni alvenis aŭtobuse al Swanwick. Kia bona loĝejo ! Ĝi tuj impresis al la ĵus alvenintaj kongresanoj.

Post la tradiciaj malfermo kaj inaŭguro kun superflua parolado de reprezentanto de IUS (Internacia Uniĝo de Studentoj) la kongreso komenciĝis.

Jen laborgrupoj posttagmeze el kiuj mi elektis tiujn pri la komputora lingvo "BASIC" kaj "Homo kaj Fervojo", ĉi-lastan Stefan McGill kompreneble gvidis. Ankaŭ prezentiĝis la aktivecoj de JES (ne la skota nek la slovaka junularasocio, sed la svisa) kaj dum la kejlida (irlanda) vespero ni popoldancis ĝisfine.

Post mia dimanĉmatena promenado laŭ la publikaj piedvojoj kiuj senescepte kondukas tra iu paŝtejo, kaj la laborgrupoj, okazis bona prelego de Carter pri muzikiloj tradiciaj kaj modernaj. La brita vespero bone komenciĝis kun prezentado de popoldancoj kaj kantoj britaj, sed la dua parto ĝeniĝis pro la amuziga etoso de la partoprenantoj, kvankam Ian Jackson prezentis enhavplenan aŭdigadon el britaj verkoj (i.a. Shakespeare) kaj brita muziko klasika kaj moderna.

Lunde Norbero Saletti prezentis la plej amuzan kaj plej mallongan prelegon de la IJK kun bildstrioj rilate al ĝia temo: homo kaj maŝino. Post la ĝenerala kunsido de TEJO estis la dramteatra vespero en kiu TESPA prezentis du teatraĵojn (monologon kaj komedion nigran) kaj la zagreba grupo vortludon koncerne al la movado; ege spirita ! Kaj konklude filmon francan originale en Esperanto el 1960, detektivema kaj tipfranca: "Angoroj". Marde ni ekskursis al Castleton kie ni vizitis la grot(et)ojn kaj kastelruinon de Riber kun bestoĝardeneto kave. Kaj vespere la kostumbalo okaze de la 25-jariĝe de JEB eĉ plaĉis min.

La antaŭlastan tagon matene Horton prelegis pri la malfacila kaj kompleksa situacio de armigado kaj posttagmeze kelkaj kongresanoj vizitis la fervojmuzeon estontan. Tuj poste mi ankaŭ ĉeestis la interesan kimralingvan kurson. Vespere sekvis la plej longa programero. de tiu ĉi IJK, nome la internacia vespero. Deko da landoj prezentis teatraĵojn, skeĉojn, kantojn kaj dancojn ĝis frumatene.



Jaŭde William Auld havis la malfacilan taskon vekigi la homojn kun sia interesenhava prelego pri la kulturbazo historia de la Esperantomovado kaj post la kafopaŭzo kelkaj komune kantis el la kantlibreto de PSEK. Posttagmeze kaj vespere prezentiĝis lumbildoj pri diversaj IJK-oj kaj la adiaŭa vespero rememorigis nin ke tiu ĉi IJK definitive finiĝis !

Vendrede dum la postkongresa kunveno en la londona Esperantoklubo ni spektis ĥaosan programon, certe kiam Antoine Mechelynck persiste provis ekludi la Espero-n ! Prezentiĝis ankaŭ Esperanto-Londona ĥoro, bone por kunkanti, speciale tion, sed feliĉe mi ne aĉetis sonkaseton de ili ! Sabate kun boato hejmen al Eŭropo ! Laca sed kontenta pri briteca internacia junulara kongreso ni adiaŭis "Ĝis Eringerfeld aŭ Augsburg !"

Jean Pierre

Diverse mededelingen

U hebt kunnen vaststellen dat deze Novaĵletero een kleiner formaat gekregen heeft en onder omslag verzonden wordt. Het eerste gebeurde om papier te besparen, het tweede laat toe een stel omslagen vooraf gereed te maken en de verzending te bespoedigen.

Het einde van het jaar is in aantocht; dit betekent dat de tijd gekomen is om het lidgeld voor 1985 te betalen. De tarieven vindt u op de eerste pagina. Wie volledig wil geinformeerd zijn over de Esperanto-Beweging (en dus het jaarboek en het tijdschrift "Esperanto" wil ontvangen) doet er best aan een (fiscaal aftrekbare) schenking van 1.250 frank te doen aan de Vlaamse Esperanto-Bond (zie laatste nummer van Esperanto-Panorama).

De nieuwe uitgave van het Esperanto-woordenboek heeft (opnieuw) vertraging opgelopen. Als verschijningsdatum wordt nu begin 1985 gemeld. Wie reeds bestelde vragen wij om wat geduld; voorafbestellen (200 fr. per exemplaar voor leden) is nog steeds mogelijk.

Markola Kongreso 1985

Adresŝanĝo:

17. Anna Allen, Diamond Cottage, Lealholm, Whitby, N.Yorks. YO21 2AQ

Novaj:

43. Franz J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-7580 Bühl 16 (Balzhofen)
44-45-46: Ges. E. Tidy kun infano, 242 Milwards, Harlow, Essex CM19 4SL

Post la decembra kunveno estos ebleco priparoli la faritajn kaj farotajn MK-laborojn.

Nia estraro proponis donaci al la kongresanoj iun fajencaĵon kiel memoraĵo. Kiu havas ideon pri bruĝa bildo, originala, facile reproduktebla, rilata al maro aŭ plurlandaj kontaktoj ?

## La 7a FLEJA-Renkontiĝo en De Pinte

kiu okazis de la 2a ĝis la 4a de novembro, estis kulmino de areto da Esperanto-aktivaĵoj: la antaŭan semajnfinon partoprenis 7 homoj (ĉefe studentoj) en rapidkurso kiun Patrick Haerick gvidis en Gent (bedaŭrinde neniu de ili ĉeestis la renkontiĝon mem), kaj dum la antaŭrenkontiĝa semajno okazis rondvojaĝo tra Flandrio de eksterlandaj gastoj de FLEJA. Tiel, la 2an de novembro mi gvidis briton kaj 2 jugoslavinojn tra nia urbo kaj poste kune kun Filip Vandenbroele veturigis ilin al la renkontiĝejo.

Rigardinte la liston de partoprenantoj jam estis evidente ke la semajnfino ne povis malsukcesi; ĉeestis krom belgoj ankaŭ britoj, germanoj, nederlandanoj, hispanoj, jugoslavoj, greko, polo, kej eĉ usonanoj, entute proksimume 75 Esperantoparolantoj. Videblas ke en tia internacia kunularo krokodilado preskaŭ ne eblis. La programo estis escepte riĉa: Dum la unua vespero estis IQ-kvizo de Dirk De Weerdt el Antverpeno kaj kantis Nicole Pairoux el Valonio. Ĉion ĉi sekvis ankoraŭ kelkaj horoj da babilado kun novaj kaj malnovaj amikoj.

Ĉefplado de la menuo okazis sabatmatenon: estis forumo pri senlaboreco kaj partoprenis en ĝi po unu homo el ĉiu lando kiu havis reprezentantojn en la renkontiĝo. Posttagmezon eblis serĉpromeni aŭ ĉeesti unu el du prelegoj. La ne-serĉpromenantoj ĉefe preferis la prelegon de Billy Waldon verŝĉeroka indiano. Li prilumis la historion, kulturon kaj lingvon de sia popolo pri kiu ni ofte havas falsan bildon. Post la kunsido de kelkaj laborgrupoj kaj la samtempa kurso por komencentoj, kaj post la vespermanĝo, finis la sabaton la prezento de la franca kantisto Max Roy Carrouges kaj "afrika nokto". Dimanĉon denove kunvenis la laborgrupoj kaj estis estis ebleco spekti prezentojn pri la ĉijara IJK en Swanwick (eĉ estis montrataj kelkaj bildoj pri la BEJI-karavano en Bruĝo).

Per tepaŭzo finiĝis ĉi tiu 7a FLEJA-renkontiĝo. Jam prepariĝas la 7a !

André Ruysschaert

## Snelcursus Esperanto te Brugge ?

Sinds meerdere jaren worden op verschillende plaatsen in het land regelmatig "rapidkursoj" georganiseerd. Het gaat om 2 dagen intensief leren, tijdens welke men de grammatica en de basiswoordenschat van Esperanto inoefent. Ook te Brugge kan een dergelijke cursus plaatsvinden, indien er een voldoende aantal deelnemers is (minimum 5 à 10 personen). Wie heeft belangstelling ? Ook ideeën voor een passend (gratis ?)leslokaal zijn welkom.

Deze vignetten







werden uitgegeven ter gelegenheid van het 70e wereldcongres te Augsburg en kosten 100 fr. voor 4 bladen met telkens 9 verschillende afbeeldingen van de congresstad (rek. 3?0.0099314.57 van Roland Rotsaert; incl. port).